


**Anna de  
Bretonio,  
dukinio kaj  
trifoja reĝino  
(1477-1514)**



Fotoj de:

-

### Tabelo de la enhavo

<b>1</b>	<b>Naskiĝo de Anna de Bretonio en 1477.....</b>	<b>11</b>
<b>2</b>	<b>Morto de la patrino de Anna en 1486.....</b>	<b>14</b>
<b>3</b>	<b>Morto de la patro de Anna en 1488.....</b>	<b>15</b>
<b>4</b>	<b>Unua edziniĝo de Anna en 1490.....</b>	<b>17</b>
<b>5</b>	<b>Dua edziniĝo de Anna en 1491 .....</b>	<b>19</b>
<b>6</b>	<b>Nasko de Charles-Orland en 1492.....</b>	<b>20</b>
<b>7</b>	<b>Tria edziniĝo de Anna en 1499.....</b>	<b>22</b>
<b>8</b>	<b>Nasko de Klaŭda en 1499 .....</b>	<b>22</b>
<b>9</b>	<b>Nasko de Renata en 1510.....</b>	<b>24</b>
<b>10</b>	<b>Morto de Anna en 1514 .....</b>	<b>25</b>
<b>11</b>	<b>La filinoj de Anna de Bretonio .....</b>	<b>27</b>
<b>12</b>	<b>La ĉefaj lokoj .....</b>	<b>28</b>
<b>13</b>	<b>La ĉefaj datoj .....</b>	<b>29</b>
<b>14</b>	<b>Franca esperanta vortaro .....</b>	<b>30</b>
<b>15</b>	<b>Referencoj .....</b>	<b>31</b>

### Tabelo de la bildoj

Bildo. 1. La dukoj de Bretonio de Johano de Montfort al Anna de Bretonio .....	5
Bildo. 2. La origino de Francisko la Dua, duko de Bretonio.....	6
Bildo. 3. La potenca familio de Rohan .....	8
Bildo. 4. Anna de Bretonio, ŝia origino kaj posteuloj .....	16
Bildo. 5. La reĝo Ludoviko la Dekunua kaj liaj infanoj.....	21

Anna de Bretonio, filino de Francisko la Dua, duko de Bretonio kaj de Margareta de Foix, naskiĝis la 25-an de Januaro 1477 en la kastelo de Nantes.


Sed antaŭ tiu naskiĝo, ni devas iom retroiri en la historio de Bretonio al la heredmilito, kiu okazis inter 1341 kaj 1364. Tiu milito finiĝis per la batalo de Auray, la 29-an de Septembro en 1364, inter la franca-bretona armeo de Karolo de Blezo helpata de Du Guesclin por la partio de Johanino de Pentievro kaj Johano de Montfort.

Karolo de Blezo malvenkis kaj estis mortigita kaj Du Guesclin kaptita.

La 12-an de Aprilo 1365, Karolo la Kvina, reĝo de Francio, kaj Johano de Montfort subskribis la traktaton de Guérande. Johano de Montfort estis agnoskita kiel la vera duko de Bretonio sub la nomo Johano la Kvara. Li agnoskis la nur honoran suzerenecon de la reĝo de Francio.

Johana de Pentievro konservis siajn bienojn en Bretonio, sen bezono omaĝi al la duko, sed ŝiaj heredontoj tion devos fari. La heredado fariĝis la privilegio nur de la viraj posteuloj. Se mankos vira heredonto en la familio Montfort por la duklando, tiam heredos la familio de Pentievro.

La heredado de la bretonia duklando okazis laŭ tiu traktato de Guérande de Johano de Montfort al Francisko la Dua. Tion montras la sekvanta bildo.



**Bildo 1. La dukoj de Bretonio de Johano de Montfort al Anna de Bretonio**

Francisko la Dua naskiĝis en 1435.

Ĉu la nova bretonia duko Francisko la Dua, filo de Rikardo d'Etampes, estis vera bretono? Ne vere. Francisko la Dua estis la nepo de Johano la Kvara, duko de Bretonio sed ankaŭ la pranepo de Karolo la Kvina, reĝo de Francio, do duone bretona kaj duone franca.

Francisko la Dua edziĝis al Margareta de Bretonio en 1455 kaj tiel iĝis ankaŭ la bofilo de la bretonia duko Francisko la Unua, kiu mortis en 1450.


Francisko la Dua fariĝis duko de Bretonio la 26-an de Decembro 1458 post la morto de sia onklo Arturo la Tria, konestablo de Richemont.

Kiam li heredis la duklandon en 1458, li estis 23-jara kaj grafo de Étampes. Li estis vivinta precipe ĉe la korto de Francio.

En 1459, li revenis al Bretonio kun sia amorantino: Antoinette de Maignelais, damo de Villequier, kiu estis 40-jara kaj antaŭa amorantino de la reĝo de Francio, Karolo la Sepa.

Francisko la Dua estis kronita, duko en Rennes, la 3-an de Februaro 1459. Lia patrino Margareta de Orléans ĉeestis. Tuj poste li reiris al la korto de Karolo la Sepa, reĝo de Francio, en Montbazon.

Antoinette de Maignelais ricevis la senjorlandon de Cholet, kie ŝi plej ofte loĝis kaj akceptis la dukon.



**Bildo 2. La origino de Francisko la Dua, duko de Bretonio**

Ludoviko la Dekunua, naskita en 1423 en Bourges, fariĝis reĝo de Francio en 1461. Li deziris kreskigi sian potencon interne kaj eksterne de Francio. Li ĉiam preferis uzi ruzaĵojn, trompaĵojn kaj monon pli ol forton por konkeri novajn regionojn kaj plivastigi sian reĝlandon.

En 1462 naskiĝis Francisko, bastarda filo de la duko Francisko la Dua.

En 1462, Alano la Naŭa, vicgrafo de Rohan mortis kaj lia filo Johano heredis de sia patro sub la nomo Johano la Dua.

La familio de Rohan estis la plej potenca familio en Bretonio post la duka familio. Ĝi estis parenca al multaj dukaj, princaj kaj eĉ reĝaj familioj. Alano la Naŭa ediĝis al Margareta de Bretonio, filino de la bretonia duko Johano la Kvara. Al ili naskiĝos kvin infanoj:

- Johana (-, estonta patrino de:
  - Johano de Rieux, marŝalo de Bretonio,
  - Thibaud de Rieux, episkopo de Quimper
- Margareta (-1497), estonta avino de la franca reĝo Francisko la Unua

- Katerina (1425-1471),
  - estonta patrino de Franciska de Dinan, gvernistino de Anna de Bretonio,
  - estonta patrino de Ludoviko de Albret, kardinalo,
  - estonta patrino de Alano de Albret, svatiĝanto al Anna de Bretonio
  - estonta avino de Charlotte, kiu edziĝos al César Borgia, kardinalo kaj filo de papo
- Béatrix,
- Alano (-1449).


Lia edzino mortis. Alano la Naŭa, kiu estis 68-jara, reedziĝis en 1450 al Maria de Loreno. Al ili naskiĝos du infanoj:

- Johano, estonta vicgrafo de Rohan sub la nomo Johano la Dua,
- Katerina.

Denove vidva, li reedziĝis al Péronnelle de Maillé, kiam li estis 74-jara. Al ili naskiĝos sep infanoj: Petro, Ludoviko, Francisko, Antono, Magdalena, Maria kaj Isabeau.

Alano mortis en 1462, kiam li estis 81-jara. Siaflanke la vicgrafo Johano la Dua de Rohan edziĝis al Maria, dua filino de la duko Francisko la Unua. Al ili naskiĝis sep infanoj:

- Francisko (1469-1488), en la armeo de la duko, li mortis en la batalo de St-Aubin du Cormier en 1488,
- Johano (1476-1505),
- Jakobo (-1527),
- Georgo (1479-1502),
- Klaŭdo (1480-1540, episkopo de Quimper,
- Anna (-1529) kaj
- Maria (-1542).



**Bildo 3. La potenca familio de Rohan**

Li estis 10-jara. Li edukiĝis kun sia edzino Maria de Bretonio, filino de la iama duko Francisko la I-a, en la kastelo de Nantes.

Ludoviko la Dekunua intrigis por subfosi la aŭtoritatecon de la bretonia duko. Tiel helpis lin Amaury de Acigné, episkopo de Nantes, kiu rifuzis omaĝi al la duko de Bretonio por siaj bienoj. La duko ekzilis la episkopon, kiu rifuĝis en Angers.

La reĝo de Francio riproĉis al la duko de Bretonio pri:

- Ties rifuzo vasale omaĝi al li,
- Ties rifuzo de la rajto apelacii al la parlamento de Parizo,
- Ties ricevo de apartaj papaj buleoj,
- Ties mem atribuo de suverena kaj senjora titoloj,
- Ties uzo de la titolo "duko dank' al Dio" en siaj aktoj
- Ties surhavo de fermita duka krono,
- Ties rajto paroli al la reĝo kiel alia reĝo

Francisko la Dua havis nur unu filon kun la dukino Margareta de Bretonio. Li nomiĝis Francisko. Li naskiĝis la 29-an de Junio 1463 sed mortis la 25-



an de Aŭgusto en la sama jaro. Li estis entombigita en la katedralo de Nantes..

En 1463, naskiĝis ankaŭ Antono, bastarda filo de la duko Francisko la Dua.

La politiko de Ludoviko la Dekunua, kiu volis kreskigi sian potencon, arigis kontraŭ la reĝo la grandajn senjorojn de Francio ĉirkaŭ Karolo de Valois, frato de la reĝo, malkontenta pro nesufiĉa apanaĵo. Post la nedecida batalo de Montlhéry, la 16-an de Julio 1465, la reĝo devis akcepti la traktatojn de Conflans kaj de Saint-Maur.

En 1465, naskiĝis ankaŭ bastarda filino de la duko Francisko la Dua.

En 1466, naskiĝis ankaŭ bastarda filo de la duko Francisko la Dua.

Karolo de Valois ricevis la duklandon de Normandio, sed li perdis ĝin rapide. En 1467, la bretonoj konkeris parton de okcidenta Normandio por Karolo de Valois sed la reĝa armeo reagis kaj sin preparis por atako al Bretonio. Tiam, Karolo la Maltima, la duko de Burgonjo, transiris la riveron Somme. Tio devigis la reĝon rapide subskribi la traktaton de Ancenis kun la duko de Bretonio. Sed poste, ekde kiam eblis, la reĝo malobeis la traktaton de Ancenis.

En la 25-a de Septembro 1469 mortis Margareta de Bretonio, dukino de Bretonio kaj filino de la duko Francisko la Unua. Ŝi multe suferis pro la prefero de la duko al Antoinette de Maignelais, lia amorantino. Antoinette de Maignelais, la duka amorantino ricevis monate de la duko dufoje pli da mono ol la dukino.

Se ne estus estinta la traktato de Guérande, Johano la Dua, vicgrafo de Rohan estus fariĝinta duko de Bretonio dank'al sia edzino Maria de Bretonio, malpliagâ fratino de Margareta de Bretonio.

En 1469 naskiĝis Francisko, la unua filo de Johano la Dua de Rohan, bofrato de la duko.

En 1469, la biblioteko de la duko entenis nur 15 librojn laŭ inventaro en tiu jaro.

En 1470, Johano la Dua de Rohan forfuĝis al la korto de la franca reĝo, kie li restados dum du jaroj kaj duono.

La 26-an de Junio 1471, Francisko la Dua reedziĝis kun Margareta de Foix, tria filino de la grafo de Foix. Kial tiu edziĝo? Eble por altiri la patron de Margareta en la aliancon kontraŭ la franca reĝo.

Okaze de la alveno de la dua edzino de la duko, Jean Meschinot (1430-1509) bretona poeto skribis poemon por ŝi. Ŝi venis al Bretonio kun gaskona sekvantaro, kio aldonis sudan karakteron al la korto de la duklando.

Margareta de Foix ricevis por vidvina heredaĵo la graflandon de Nantes, la regionon de Guérande kaj imposton ricevitan por enveno de anĝevia vino en la graflando.

Margareta de Foix kaj la duko havos du filinojn: Anna kaj Isabeau.

En 1472, la frato de Margareta de Foix fariĝis episkopo de Vannes kaj pli poste kardinalo, sed li tre malofte vivis en Vannes.

En 1472, la reĝo Ludoviko la Dekunua reatakis la duklandon kaj konkeris Machecoul, Ancenis kaj La Guerche.

Ankaŭ en 1472, mortis Karolo de Valois, frato de la reĝo, potenca aliancano de la bretonia duko.

En 1473, naskiĝis ankaŭ Franciska, bastarda filino de la duko Francisko la Dua.

En Marto 1473 mortis la grafo de Armagnac kaj en Junio 1474 la duko de Alençon. Sekve la koalicio kontraŭ la franca reĝo malfortiĝis.

Interne de la duklando, estis ankaŭ du partioj, kiuj luktis unu kontraŭ la alia pri la estonta politika stato de Bretonio: unue, la partio de Guillaume Chauvin, kanceliero de Bretonio, favora al la franca reĝo, due, la partio de Pierre Landais, la trezoristo, favora al la rezistado kontraŭ la reĝo.

La partio de Guillaume Chauvin konsistis el la senjoroj kaj la prelatoj, kiuj havis bienojn, pensionojn aŭ avantaĝojn en Francio kaj kiuj timis perdi ilin. Plie tiuj partianoj estis ofte subaĉetitaj de la reĝo.

Pierre Landais estis drapisto, kiu riĉiĝis per la komercado. Lia partio arigis la negocistojn kaj la sendependistojn.

La reĝo konspiris kun Chauvin por damaĝi al Landais. La spionoj de la reĝo subaĉetis mesaĝiston nomatan Gourmel, kiu devis porti al Anglio projekton de traktato inter Bretonio kaj Anglio preparitan de Landais.

Kiam Chauvin vizitis la francan reĝon kiel eksterordinara ambasadoro, la reĝo informis lin pri tio kaj komisiis lin postuli de la duko la rompon de tiu alianca projekto. Malbonŝance por ili, la duko nur mortigis la mesaĝiston. Gourmel mortis pro drono en sako ĵetita en la rivero en Auray. Tiu afero nur pligrandigis la prestiĝon de Landais.

En 1475, mortis Antoinette de Maignelais, damo de Villequier, la tre influa amorantino de la duko Francisko la Dua. Ŝi estis naskinta kvar infanojn de la duko:

- Francisko, barono de Avaugour,
- Antono de Bretonio,
- Franciska
- Alia filino

Ĉiuj bastardoj vivis ĉe la korto de la duko en Nantes.

En 1475, pro la minaco de Karolo la Maltima kaj de angla armeo, Ludoviko devis subskribi novan traktaton en Senlis kaj redoni la fortikajn urbojn laŭ la landlimo de Bretonio.

La 5-an de Januaro 1477, Karolo la Maltima mortis, kiam lia armeo sieĝis Nancy. Tiam la duko de Bretonio perdis sian ĉefan apogilon kontraŭ la ambicio de la reĝo de Francio.

## 1 Naskiĝo de Anna de Bretonio en 1477

**La 25-an de Januaro 1477, naskiĝis Anna de Bretonio en la kastelo de Nantes. Per sia patro, la bretonia duko Francisko la Dua, ŝi estis duone franca-bretona kaj per sia patrino, Margareta de Foix, duone gaskona-hispana.**

Anna, en tiu epoko, ne estis aparte bretona antaŭnomo. Ĝi estis pli komuna en Francio (Anna de Beaujeu, filino de la franca reĝo Ludoviko la Dekunua).

La duko Francisko la Dua, kiu estis naskita en 1435, estis 42-jara. Li seniluziiĝis. Kompreneble li preferis filon ĉar la heredo de la duklando, laŭ la traktato de Guérande, povus resti en la familio de Montfort nur se estus vira heredanto kaj alikaze irus al la familio de Pentievro.

La sorto de Anna dependis de eventuala naskiĝo de frato.

*Anna de Bretonio, dukino kaj reĝino*

La duko kaj Landais konfidis la edukadon de Anna al Franciska de Dinan, nevino de Johano la Dua de Rohan kaj estonta grafino de Laval.

Chauvin provis damaĝi al Landais, atakante lin pro lia administrado. Post longa proceso, Landais senkulpiĝis kaj siavice akuzis Chauvin.

Ludoviko la Dekunua aĉetis de Nikola de Blois, pranepino de Johana de Penthièvre, ŝiajn pretendajn rajtojn al la dukeco de Bretonio. En 1465, Francisko la Dua konfiskis la apanaĝon de Penthièvre, pro la fakto ke la edzino de Nikola estis elektinta la partion de la reĝo kontraŭ la senjoroj kaj la duko.

En 1478 (aŭ 1481??), naskiĝis Isabeau, la dua filino de la duko.

Konvinkita ke la reĝo volis akapari la duklandon, la duko strebis al nova alianciĝo kun Anglio kaj Maksimiliano de Aŭstrio.

En la 16-a de Aprilo 1481, Francisko la Dua subskribis traktaton kun Maksimiliano de Aŭstrio kontraŭ la franca reĝo Ludoviko la Dekunua.

La 10-an de Majo 1481, la duko subskribis novan aliancan traktaton kun Anglio, kiu enhavis promeson pri edziniĝo de lia filino Anna al la angla kronprinco aŭ mankokaze al la duko de York, ambaŭ filoj de la angla reĝo Eduardo la Kvara.

En la 5-a de Oktobro 1481, Chauvin estis kondamnita pro sia agnoskita alianciĝo al la reĝo kaj arestita.

En 1483 mortis la reĝo de Francio, Ludoviko la Dekunua, sed Anna de Beaujeu, ŝia filino, kiu fariĝis regentino de Francio dum la neplenaĝeco de Karolo la Oka, agis tute simile al sia patro, tio estas senskrupule, trompe kaj perfide.

En la 5-a de Aprilo 1484, Chauvin mortis en karcero post suferoj. La amikoj de Chauvin kulpigis Landais pro lia morto. La marŝalo de Rieux, Jean de Châlons, nevo de la duko, Louis de Rohan, edzo de la dua filino de Francisko la Unua provis kapti Landais, kiun li kredis en la kastelo de Nantes. La loĝantoj de Nantes, konvinkitaj ke ili celis la dukon, kiun ili estimis, reagis forte kaj la konspirantoj devis rifuĝi al Anĝevio. La duko konfiskis iliajn bienojn por puni ilin. Tiam la konspirantoj ne hezitis kaj subskribis traktaton la 22-an de Oktobro 1484 en Montargis kun la regentino Anna de Beaujeu en kiu ili agnoskis Karolon la Okan kiel la pravan heredanton de Nikola de Brosse.

*Anna de Bretonio, dukino kaj reĝino*

Tamen Landais daŭrigis sian laboron kaj eĉ ĉeestis la Ĝeneralajn Ŝtatojn de Blois kaj strebis al nova alianco kun francaj senjoroj kontraŭ la regentino.

Sed la malamikoj de Landais daŭre klopodis damaĝi al li. De Ancenis, la marŝalo de Rieux minacis Nantes. La duko rezistis kun 4000 soldatoj komandataj de Coëtquen. Coëtquen perfidis sian dukon kaj kunigis sian armeon al tiu de Rieux kaj invadis la kastelon de la duko. La duko devis liveri Landais, kiu estis rapide kondamnita al morto per pendumo la 19-an de Julio 1485 sen vera proceso. Oni riproĉis al li:

- Lian kruelecon pri Chauvin, la kanceliero de Bretonio, favora al la franca reĝo,
- Lian konfiskon de la bienoj de la abato de Saint-Méen, kiam ili devis esti donitaj al Francio,
- Lian konfiskon de la bienoj de Jacques de l'Espinay, episkopo de Rennes, kiu perfidis sian dukon,
- Lian nenobelan originon
- Lian akaparon de la regado,
- Lian preterpelon de la nobelaro

Li fakte mortis pro sia tro granda politika influo al la duko malfavora al la bretoniaj senjoroj.

La duko eksciis pri lia kondamno nur post lia ekzekuto.

La malamikoj de Landais asertis, ke ilia ribelo estis nur kontraŭ Landais kaj certe ne kontraŭ la duko kaj pro tio la duko konsentis ĝeneralan amnestion la 12-an de Aŭgusto 1485.

Samtempe okazis diskutoj inter la duko kaj la regentino, kies konkludo estis la traktato de Bourges inter la duko kaj la reĝo en kiu ili ĵuris unu al la alia "eternan pacon, amikecon, alianciĝon, ktp." Tiu traktato ne estis pli obeata ol la antaŭaj.

Kiam Jean de Brosse mortis, la regentino Anne de Beaujeu akiris de Nikola de Penthièvre la konfirmon de la forcedo de ŝiaj pretendaj rajtoj al la duko.

La regentino ankaŭ pagis la bretoniajn senjorojn favorajn al la reĝo.

La duko timis la heredajn problemojn post sia morto. Li eĉ ne fidis iujn membrojn de sia familio: Avaugour (lia neleĝa filo) kaj Rohan (lia bofrato). Pro tio, la 8-an de Februaro 1486, la duko kunvenigis la Ĝeneralajn Ŝtatojn de Bretonio en Rennes por agnoskigi la rajtojn de siaj filinoj: Anna kaj Isabeau per ĵuro.

## **2 Morto de la patrino de Anna en 1486**

En 1486 mortis Margareta de Foix, la dua edzino de la duko Francisko la Dua. Anna estis nur 9-jara kaj Isabeau, ŝia fratino nur 8-jara.

En Januaro 1487, Ludoviko de Orléans eskapis el la kortego de la franca reĝo kaj rifuĝis en Bretonio.

En marto 1487, Franciska de Dinan kunigis la malkontentulojn en Châteaubriant. Ŝi deklaris, ke la reĝo promesis 6000 soldatojn por forpeli la princojn el la duklando. Interŝanĝe, la bretoniaj senjoroj (Rieux, Laval, Rohan, ktp) subskribis traktaton, kiu agnoskis la rajtojn de la reĝo super la duklando. Tio estis nova perfido de la bretoniaj senjoroj.

Fakte, la reĝa armeo konsistis ne el 6000 soldatoj sed el 15000, ĝi eniris Bretonion per la urboj liveritaj de Rieux.

En la 1-a de Junio 1487, la reĝa armeo ekokupis Ploërmel kaj konkeris Vannes en la 5-a de Junio.

Francisko kunigis armeon el 16000 soldatoj en Malestroit, sed la bretoniaj senjoroj sukcesis konfuzi la miliciojn kaj la duko devis rifuĝi en Nantes.

La reĝa armeo eksieĝis la urbon Nantes en la 19-a de Junio 1487 sed la duka armeo, la burĝa milicio kaj helpo de kaparanaj milicioj (oni parolas pri la kapitano Marion de Quimper kun ŝipo kaj 120 ŝipanoj) bone defendis la urbon. Sekve post du monatoj, la reĝa armeo decidis levi la sieĝon.

En Aprilo 1488, nova franca armeo invadis la duklandon. Tiu armeo, komandata de La Trémoille, konsistis el 15000 soldatoj, inter ili estis 6000 svisoj. Ĝia potenca artilerio kapablis difekti kaj eĉ trui la muregojn de la bretoniaj kasteloj.

En la 19-a de Aprilo, la urbo Ancenis estis kaptita.

En la 23-a de Aprilo la reĝa armeo konkeris Châteaubriant.

La 19-an de Julio, la urbo Fougères estis konkerita de la francoj.

La 28-an de Julio 1488, okazis la batalo de Saint-Aubin-du-Cormier inter la reĝa kaj la duka armeoj. La duka armeo konsistis el apenaŭ 12000 soldatoj el kiuj estis 4600 eksterbretoniaj soldatoj (angloj, germanoj, hispanoj, gaskonoj, ktp).

En la unua vico de la bretonia armeo piede batalis la eksterduklandaj princoj, inter ili estis Ludoviko de Orléans, la estonta reĝo de Francio. Ludoviko de Orléans estis kaptita en la batalo kaj enkarcerigita dum tri jaroj antaŭ ol esti liberigita kaj fariĝi la duko de Normandio.

Francisko de Rohan, kiu estis 19-jara, tie estis mortigita, batalante por sia duko dum lia patro batalis en la alia armeo por la reĝo.

La bretonoj perdis 6000 batalantojn kaj la francoj nur 1500.

En la 7-a de Aŭgusto 1488, la reĝa armeo konkeris la urbon Dinan.

La 19-an de Aŭgusto 1488, traktato pri paco estis subskribita inter la duko kaj la reĝo en Le Verger. La duko Francisko la Dua konsentis pri:

- La forigo de la eksterlandaj senjoroj
- Akiro de reĝa konsento antaŭ ol edzinigi siajn filinojn.

La reĝo konservis Saint-Malo, Fougères, Dinan kaj Saint-Aubin du Cormier ĝis la heredo de la dukeco. La reĝo foriris kun sia armeo sen postuli kompensaĵojn.

### **3 Morto de la patro de Anna en 1488**


La 9-an de Septembro 1488, la duko Francisko la Dua, kiu ne eltenis la malvenkon, post falo de ĉevalo, mortis. Li testamentis por sia entombigo apud sia unua edzino en Nantes kaj por la tutoreco de siaj filinoj. Li konfidis siajn filinojn al la marŝalo de Rieux kaj al Franciska de Dinan, grafino de Laval, kvankam tiuj personoj ofte estis komplotintaj kontraŭ li.

La duko Francisko estis unue entombigita en la preĝejo de Carmes kaj post la franca revolucio lia tombo estis transigita al la katedralo de Nantes.

Anna, la filino de Francisko la Dua, estis 11-jara, kiam ŝi heredis la duklandon. La konsilio de Anna konsistis el Philippe de Montauban, kiu estis la kanceliero de Bretonio, la marŝalo de Rieux, Dunois kaj Albret.

Multaj kandidatoj deziris edziĝi al Anna de Bretonio. Inter ili estis Albret, kiu estis 50-jara kaj jam havis 7 leĝajn infanojn (preferata de Rieux), Maksimiliano de Aŭstrio, la filo de la vicgrafo de Rohan kaj aliaj.

La vicgrafo de Rohan, pro sia edzino Maria de Bretonio, pretendis pri rajtoj al la duklando kaj subtenis la reĝon Karolo la Oka esperante ricevi Annan kiel edzinon por sia filo. Laŭ ordono de la reĝo, li konkeris la urbon Guingamp.



Bildo 4. Anna de Bretonio, ŝia origino kaj posteuloj

La marŝalo de Rieux, kiu estis la guberniestro de Bretonio kaj la kuratoro de Anna dum ŝia neplenaĝeco, estis malkontenta pro la fakto, ke Anna rifuzis ĉiujn petojn pri edziniĝo kaj precipe tiujn de la kandidatoj, kiuj estus ebligintaj al la marŝalo konservi sian influon.

La marŝalo malpermesis al ŝi eniri la urbon Nantes, kiun li okupis. Tial, konsilata de Philippe de Montauban, ŝi decidis iri al Rennes.



La 10-an de Februaro 1489, Anna, kiu estis nur 12-jara, estis kronita dukino en la katedralo de Rennes meze de entuziasma loĝantaro. La bretonoj jam admiris ŝian kuraĝon kaj ŝian malfeliĉan situacion.

Anna, perfidita kaj forlasita de la senjoroj, ŝtelita de la marŝalo de Rieux, kiu kaptis la duklandan monon, devis peti helpon de la bretonoj kaj de kontraŭreĝaj eksterlandanoj por la militaj elspezoj.

La reĝo de Francio, Karolo la Oka deklaris la militon al Bretonio. Armeo el 12000 soldatoj atakis la duklandon kaj okupis Montfort la 9-an de Januaro, Moncontour la 17-an de Januaro, Guingamp la 22-an de Januaro, poste Morlaix kaj Brest, Concarneau la 15-an de Februaro, Vannes la 19-an de Februaro.

Sed poste burĝoj kaj kamparanoj, helpe de 6000 angloj kaj 2000 kastilianoj ribelis kaj kontraŭatakis tiel sukcese ke, en Julio, la reĝa armeo jam estis reveninta al sia origina pozicio.

Pro la milito kun Maksimiliano de Aŭstrio, Karolo la Oka devis subskribi traktaton pri paco en Frankfurto la 22-an de Julio 1489. Bretonio, aliancano de Maksimiliano estis en tiu traktato. Sekve mallonga paca periodo daŭris en la duklando.

Anna decidis rekonkeri Nantes, kaj pro tio arigis armeon. La marŝalo finfine akceptis redoni la urbon sen kontraŭ 100 000 eskudoj.

En 1490, Isabeau, la fratino de Anna, fianĉiniĝis al la filo de Alano de Albret (tiu, kiun Anna forte rifuzis). La geedziĝo ne okazis ĉar ŝi mortis en la 24-a de Aŭgusto 1490 en Rennes, kie oni entombigis ŝin.

## **4 Unua edziniĝo de Anna en 1490**

La 19-an de Decembro 1490, Anna edziniĝis al Maksimiliano de Aŭstrio, estonta imperiestro de Germanio, per prokuro kun la espero certigi la sendependecon de Bretonio. Maksimiliano, kiu estis edziĝinta al Maria de Burgonjo, filino de Karolo la Maltima, post ŝia morto estis vidva. Simbole, Von Polheim, la sendinto de Maksimiliano enŝovis sian nudan gambon en la lito de Anna, kiu tiel fariĝis la reĝino de la romianoj.

Sed tio estis malobee al la traktato de Le Verger, kiu postulis ke edziniĝo de la filinoj de la duko Francisko la Dua ne povus okazi sen antaŭa akiro de konsento de la franca reĝo.

Tiu edziniĝo celis la konservadon de la sendependeco de Bretonio, sed samtempe la franca reĝo ne povis akcepti tion ĉar lia reĝlando tiel fariĝis ĉirkaŭata per bienoj de la habsburga familio.

Pro tio la franca reĝo decidis la almarŝon de sia armeo al Bretonio.

La 20-an de Marto 1491 (aŭ la 4-an de Aprilo), Nantes estis liverita al la francoj pro la perfido de la senjoro de Albret. Poste la reĝo eniris Bretonion kaj en Aŭgusto li estis konkerinta la tutan duklandon krom Rennes.



La sigelilo de la dukino  
(<http://sigillum.fr.st/>)

La reĝo decidis la eksieĝadon de Rennes. Iom post iom Anna konvinkiĝis ke Maksimiliano, kiu batalis kontraŭ la turkoj, ne defendos ŝin. Post du monatoj sub intensa sieĝado, Anna finfine konsentis pri la edziniĝo al la franca reĝo.

La 15-an de Novembro 1491, Anna kaj Karlo la Oka subskribis traktaton pri paco.

Tamen, Karolo la Oka estis jam fianĉigita de 7 jaroj al Margareta de Aŭstrio, filino de Maksimiliano. Stranga situacio, en kiu la reĝo ŝtelis la edzinon de Maksimiliano kaj perfidis sian promeson edziĝi al filino de Maksimiliano. Plie, Karolo devis peti nuligon de la geedziĝon de Anna kun Maksimiliano al la papo. Estis do multaj malfacilaĵoj kaj timoj pri la reago de Maksimiliano. Pro tio, oni decidis rapide agi.

La 19-an de Novembro 1491, Anna kaj Karolo la Oka gefianĉiĝis en la kapelo de Notre-Dame-de-Bonne-Nouvelle en Rennes.

## 5 Dua edziniĝo de Anna en 1491



Karolo la Oka

La 6-an de Decembro 1491, Anna, dukino de Bretonio, edziniĝis al Karolo la Oka, reĝo de Francio en la kastelo de Langeais en regiono Touraine.



Ŝi estis 14-jara kaj Karolo la Oka estis 21-jara.

La kontrakto inter la dukino kaj la reĝo donis unu al la alia la rajtojn pri Bretonio. Se Karolo mortus antaŭ Anna sen lasi infanon, Anna ne rajtis edziniĝi laŭ ŝia deziro; ŝi povus nur edziniĝi al la estonta reĝo "se li tion volos kaj se eblos".

En 1491, oni nombris 31 librojn en la biblioteko de la kastelo de Nantes, el kiuj pli ol duono estas meslibroj.



Anna

La 8-an de Februro 1492, Anna estis kronita reĝino de Francio en la baziliko de Saint-Denis.

La vicgrafo de Rohan perdis sian vicreĝan postenon en la kortego de Bretonio, kaj pro malkontento petis apogon de la angla reĝo por agnoski sin kiel la dukon de Bretonio. Li malsukcesis sed tio devigis la reĝon konfirmi rajtojn de Bretonio en la 7-a de Julio 1492.

Karlo la Dekdua agnoskis al la bretonoj:

- La rajton pagi nur la impostojn laŭ la decidoj de la bretonia ordarasembleo,
- La rajton utiligi la akcizojn al la defendo de la duklando,

*Anna de Bretonio, dukino kaj reĝino*

- La rajton por la bretonoj esti juĝata nur en Bretonio

Anna, nova reĝino de Francio, ne plu rolis en la administrado de la duklando. Ŝi naskis 4 infanojn sed neniu el ili post vivis.

## 6 Nasko de Charles-Orland en 1492

En la 10 de Oktobro 1492 en Plessis-lez-Tours (la lasta loĝejo de la franca reĝo Ludoviko la Dekunua), Anna, kiu estis nur 15-jara, naskis Charles-Orland. Li estis baptita en la 13-a de Oktobro.

La dua filo de Anna, Francisko frue naskiĝis kaj mortis en Julio 1493.

Karolo la Oka mem regis Bretonion. La 9-an de Decembro 1493, la franca reĝo forigis la kancelieran postenon en Bretonio.

En 1494 filino mortinte naskiĝis.

En 1494, Karolo la Oka lanĉis ekspedicion al Italio ĝis Napolo, en kiun li eniris en la 22-a de Februaro 1495. Lia armeo estis bone akceptita, sed iom post iom ĝi malbone kondukis kaj Karolo la Oka devis reveni al Francio post la nedecida batalo de Fornoue, kiu okazis en la 6-a de Julio 1495.

Printempe de 1495 nova filino mortinte naskiĝis.

En la 16-a de Decembro 1495, Charles-Orland, kiu estis nur 3-jara, mortis pro epidemio de morbilo (fr. rougeole). Maŭzoleo de Charles-Orland kun fratino estas videbla en preĝejo de Tours.

En la 8-a de Septembro 1496 frue naskiĝis Karolo en Plessis-lez-Tours. Li mortis en la 2-a de Oktobro en la sama jaro.

En la 20-a de Marto 1498 naskiĝis Anna en Plessis-lez-Tours sed ŝi mortis post kelkaj horoj.


La 7-an de Aprilo 1498, Karolo la Oka, kies kapo estis frapinta la lintelon de pordo, mortis.

De 1492, kiam ŝi estis 15-jara ĝis 1498, la dukino Anna gravediĝis ĉiujare sed neniu infano postvivis tiun periodon.

Anna estis 21-jara, kiam ŝi fariĝis vidvino. La 9-an de Aprilo 1498, mesaĝisto deiris al la duklando por anonci ke la reĝino restaŭris la kancelieran postenon kaj renomumis Philippe de Mautauban por okupi tiun postenon.

Anna reakiris siajn rajtojn pri la duklando.

En la 27-an de Majo 1498, Ludoviko de Orléans estis kronita kiel nova franca reĝo sub la nomo Ludoviko la Dekdua. Li estis la edzo de Johana de Francio, la lama filino de Ludoviko la Dekunua kaj la fratino de Karolo la Oka. Li estis ankaŭ la duko de Orléans, kiu antaŭ dek jaroj estis unu el la komandantoj de la bretona armeo kontraŭ la franca reĝo.



**Bildo 5. La reĝo Ludoviko la Dekunua kaj liaj infanoj**

Anna akceptigis de la nova reĝo, ke liaj soldatoj eliru el Bretonio.

Anna konsentis edziniĝi al nova reĝo, laŭ la kontrakto kun la antaŭa reĝo, kondiĉe ke Ludoviko la Dekdua sukcesu nuligi sian propran edziĝon kun Johana de Francio. La reĝo promesis redoni ĉiujn fortikajn urbojn, kiujn li okupis en Bretonio, escepte de Fougères kaj Nantes, kiujn li decidis konservi ankoraŭ dum unu jaro. Se la geedziĝo ne okazus en tiu periodo, tiam Anna refariĝus libera kaj la reĝo devus forcedi la du fortikajn urbojn.

La 28-an de Septembro 1498, Anna prezidis la Ordarasembleon de Bretonio kunveninta en Rennes.

De la 10-a de Aŭgusto al la 17-a de Decembro 1498, okazis la proceso, kiu nuligis la edziĝon de la reĝo. Ludoviko la Dekdua pledis, ke li edziĝis al Johana de Francio sub la minaco de la reĝo kaj ke plie ŝi pro korpaj difektoj ne kapablis plenumi la geedzajn agojn. La papo Aleksandro la Sesa Borgia konsentis pri tio.

La 3-an de Januaro 1499 mortis Franciska de Dinan, grafino de Laval, kiu zorgis pri la edukado de Anna.

## 7 Tria edziniĝo de Anna en 1499



Ludoviko la Dekdua

La 8-an de Januaro 1499, Anna de Bretonio edziniĝis al Ludoviko la Dekdua en la kapelo de la kastelo de Nantes, ŝi estis en forta pozicio por trudi siajn kondiĉojn.

Por konservi la aŭtonomecon de la duklando, nur ilia dua infano heredos ĝin. Anna ne volis, ke la unua infano, kiu aŭtomate heredos la reĝlandon ankaŭ heredu la duklandon kaj tiel unuigus ilin.

La reĝo promesis ankaŭ obei la rajtojn, senimpostecojn kaj kutimojn de Bretonio.

## 8 Nasko de Klaŭda en 1499

En la 13-a de Oktobro 1499, naskiĝis Klaŭda en Romorantin. Ŝi nevole tuj ludis gravan rolon en la eŭropa diplomatio pro ŝia rajto pri la duklando de Bretonio.

Anna de Bretonio arigis multanan kortegon, influis la reĝan politikon kaj helpis la artojn. Ŝi zorgis pri sia duklando, kiu reprosperis.

En 1500, Ludoviko la Dekdua estis konkerinta preskaŭ la tutan Italion.





Mono de Anna (kun lilioj de Francio kaj ermenoj de Bretonio)

Anna plu deziris konservi la aŭtonomecon de sia duklando, pro tio ŝi preferis edzinigi Klaŭdan al Karolo de Luksemburgio, la nepino de Maksimiliano de Aŭstrio. Sed la konsilantoj de la reĝo forte kontraŭis tiun ideon kaj insistis por ke, Klaŭda edziniĝu al la heredonto de la franca reĝlando. Anna devis cedi kaj akcepti tiun lastan proponon.

La 21-an de Januaro 1503 naskiĝis Francisko en Blezo sed li baldaŭ mortis meze de Februaro 1503.

En Septembro 1504, Anna sukcesis subskribigi la traktaton de Blois, kiu antaŭvidis la geedziĝon de ŝia filino, Klaŭda de Francio, kun Karolo de Luksemburgio, estonta Karola la Kvina, germana imperiestro.



Anna preĝanta kun malantaŭ ŝi: sankta Anna, sankta Ursula (tenanta bretonan standardon) kaj sankta Helena (el preĝlibro de Anna de Bretonio en la Nacia Biblioteko de Francio)

En la 18-a de Novembro 1504, Anna estis kronita kiel reĝino por la dua fojo en la baziliko de Saint-Denis. Ŝi unue kontraŭis tiun ideon pro la fakto ke ŝi jam estis kronita kaj pro timo al la pariza popolo. La franca reĝo insistis kaj aranĝis ĉion por certigi sukcesan okazaĵon.

Sed post grava malsano, en Majo 1505, la franca reĝo skribis testamenton, en kiu li rompis la fianĉiniĝon de Klaŭda kaj ordonis kiel eble plej rapidan edziniĝon al Francisko de Angoulême.

Pro malkontento pro tiu decido kaj oficiale pretekste de promeso ŝia kaze de reĝoresaniĝo, en Junio Anna foriris por fari pilgrimon al Folgoët sed ŝi pluiris por faris triumfan pilgriman rondiron en Bretonio (bretonlingve Tro Breizh), kiu finiĝis en Septembro 1505 pro koleriĝo de la reĝo, kiu postulis ŝian revenon. Anna tiel povis konstati la fidelecon de la popolo de sia duklando.

Post reveno de tiu pilgrimo, Anna provis konvinki la reĝon ŝanĝi sian decidon pri la estonteco de Klaŭda sed vane.

La 21-an de Majo 1506 okazis la gefianĉigo de Klaŭda kaj Francisko de Angoulême.

En 1506, la francoj estis forpelitaj el Napolio de la armeo de Fernando de Aragono.

En Oktobro 1507 Anna naskis mortintan filinon.

## 9 Nasko de Renata en 1510

Anna naskis Renatan, sian duan filinon en Blezo, la 20-an de Oktobro 1510.

La bretonoj partoprenis en la bataloj de la reĝo en Italio kaj kontraŭ Anglio.

En la 21-a de Januaro 1512, filo mortinte naskiĝis.



Anna de Bretonio kaj la reĝo:  
Ludoviko la Dekdua.

En 1512, Ludoviko la Dekdua perdis la Milanion.

*Anna de Bretonio, dukino kaj reĝino*



En 1513, la malvenko de Novare en Italio signis la finon de la italaj aventuroj de la franca reĝo.

La 10-an de Aŭgusto 1513, la bretona ŝiparo eliris el Brest por batali kontraŭ la angla ŝiparo. La admiralŝipo "La Cordelière" komandata de Hervé de Portzmoguer (fr.: Primauguet) glorie malvenkis.

Anna kaj Ludoviko la Dekdua havis kvin infanojn sed nur Klaŭda kaj Renata postvivis.

## 10 Morto de Anna en 1514

La 9-an de Januaro 1514, Anna, dukino de Bretonio, reĝino de Francio mortis en Blois, kiam ŝi estis 36-jara. La funebraj ceremonioj estis grandiozaj kaj daŭris dum kvin semajnoj.

La 12-an de Februaro, la funebrantaro atingis Parizon.

La 15-an de Februaro, funebra meso estis dirita en la katedralo Notre-Dame.

La 16-an de Februaro, la ĉerko estis transportita kaj entombigita en la baziliko St-Denis.


En Blois, ŝia koro estis lokita en ora korforma relikvujo kaj transportita laŭ ŝia volo, al Nantes. Ĝi atingis Nantes en la 13-a de Marto. Tie mesoj estis diritaj dum ses tagoj.

La 19-an de Marto, la burĝoj, la nobeloj, la metiistoj, la religiuloj kaj malriĉuloj procesiis tra la urbo kun la kanceliero de Bretonio, kiu portis la relikvujon por iri al la preĝejo de Carmes por meso.

Poste la relikvujo kun la koro de Anna estis entombigita inter la ĉerkoj de Francisko la Dua, ŝia patro kaj Margareta de Foix, ŝia patrino, en la belega tombo, kiun ŝi konstruigis al ili en la katedralo de Nantes.

*Dum la revolucio, la tombo estis perforte malfermita kaj la relikvujo malaperis dum kelkaj jaroj. Nun, ĝi malplena troviĝas en la muzeo Dobrée en Nantes.*

La 8-an aŭ la 18-an de Majo 1514, Klaŭda, la pliaĝa filino de Anna, kiu estis 15-jara edziniĝis al Francisko, kuzo de Ludoviko la Dekdua kaj grafo de Angoulême, kiu estis 19-jara.



Maŭzoleo de Ludoviko la Dekdua kaj de Anna de Bretonio en la baziliko St-Denis.

La 7-an de Aŭgusto 1514, paca traktato estis subskribita inter la francoj kaj la angloj.

Maria de Anglio, juna fratino de la angla reĝo Henriko la Oka, alvenis al Francio en la 3-a de Oktobro.

La 9-an de Oktobro okazis la geedziĝo de Ludoviko la Dekdua kaj de Maria de Anglio.

La 21-an de Decembro 1514, Ludoviko la Dekdua mortis sen infanoj. Li estis entombigita en la baziliko Saint-Denis apud sia edzino Anna de Bretonio.

La 1-an de Januaro 1515, Francisko de Angoulême fariĝis reĝo de Francio sub la nomo Francisko la Unua. Klaŭda, ŝia edzino, kiu ne havis la karakteron de sia patrino, forcedis ĉiujn siajn rajton pri la duklando al sia edzo.

En 1532, la Ordarasembleo de Bretonio aprobis la kuniĝon de Bretonio al la franca reĝlando. Tamen ili decidis la konservon de la privilegioj, la justica kaj imposta aŭtonomeco de Bretonio.

La blazono de la dukoj de Bretonio estis ermenplena kun la moto "Potius mori quam foedari", kio signifas "Morti prefere ol esti makulita". La ermeno estis enkondukita de Pierre Mauclerc en la 13-a jarcento.

Oni rakontas, ke iutage ĉasante, Anna vidis ermenon, kiu preferis morti fronte al ĉasistoj ol makuli sian felon traitante kotan areon. Kortuŝita, Anna ŝparis ĝian vivon, kaj memore al tiu okazaĵo adoptis la emenpelton kiel sian simbolon.

Anna estis 10-foje graveda. Ŝi naskis 4 mortintajn infanojn. 3 mortis nelonge post la nasko, filo (Charles-Orland) mortis junaĝe kaj nur du filinoj (Klaŭda kaj Renata) postvivis.

*Anna de Bretonio, dukino kaj reĝino*

La patrino de Francisko de Angoulême, Luiza de Savojo, ĉiam kun timo atentis ĉiujn gravediĝojn de Anna, ĉar okaze de nasko de filo, la reĝlando de Francio estus elglitinta el la manoj de ŝia filo Francisko.

## 11 La filinoj de Anna de Bretonio

Nur du filinoj de Anna de Bretonio kaj la franca reĝo Ludoviko la Dekdua postvivis: Klaŭda kaj Renata.



Klaŭda, filino de Anna de Bretonio  
kaj de Ludoviko la Dekdua

Klaŭda, filino de Anna kaj reĝino de Francio, naskiĝis Klaŭda en Romorantin en la 13-a de Oktobro 1499. Klaŭda edziniĝis al Francisko de Angoulême, kiu fariĝis Francisko la Unua, reĝo de Francio.

Klaŭda naskis sep infanojn:

- Ludovika (1515-1517),
- Charlotte (1516-1524),
- Francisko (1518-1536), kronprinco de Viennois , duko de Bretonio
- Henriko (1519-1559), duko de Orleano, kronprinco de Viennois (1536), duko de Bretonio (1539), reĝo de Francio (1547) sub la nomo Henriko la Dua,
- Magdalena (1520-1537), edziniĝis al la skota reĝo en 1537,
- Karolo (1522-1545), duko de Angoulême, de Orleano, de Châtellerault kaj de Burbono,
- Margareta (1523-1574), dukino de Berry, edziniĝis al la duko de Savojo
- Filipo(1524-1525), edziĝis al Eleonoro de Habsburgo, filino de la hispana reĝo

Klaŭda mortis en 1524.



Renata, dua filino de Anna de Bretonio kaj de Ludoviko la Dekdua

Renata de Francio (1510-1575), dua filino de Ludoviko la Dekdua kaj de Anna de Bretonio, naskiĝis en Blezo, la 20-an de Oktobro 1510.

Ŝi edziniĝis en 1528 al Herkulo la Dua de Esto (1508-1559), duko de Ferrare, de Modeno kaj de Reggio.

Ŝi estis sinsekve promesita kiel edzino al Gastono de Foix, al Karolo de Aŭstrio (estonta imperiestro Karolo la Kvina), al lia frato Ferdinando, al Henriko la Oka de Anglio kaj al Joakimo de Brandeburgo.

En ŝia kortego, kunvenis beletristoj kaj rifuĝis persekutitaj francaj kalvinanoj. Renata akceptis Clément Marot kaj Kalvinon en sia bieno kaj fine fariĝis reformacianino.

Tio ne plaĉis al ŝia edzo, kiu forpelis ŝiajn amikojn, deprenis ŝiajn infanojn, enkarcerigis ŝi.

Post lia morto en 1559, ŝi reiris al Francio kaj ŝia bieno en Montargis fariĝis centro por protestanta varbado.

Dum la religimilitoj ŝi estis plurfoje atakita de la katolikaj trupoj. En 1562, ŝia kastelo estis sieĝata de sia bofilo, la duko de Guise.

Renata naskis du infanojn:

- ,
- 

Renata mortis en 1575 en Montargis.

## 12 La ĉefaj lokoj

**Amboise:** urbo sur la rivero Loire inter Blois kaj Tours. Tie, la kapo de la reĝo Karolo la Oka frapis lintelon de malalta pordo kaj pro tio li mortis iom poste.

**Ancenis:** unu el la lastaj bretonaj urboj proksime de la franca reĝlando.

**Blois:** urbo sur la rivero Loire. Tie, naskiĝis Renata, la dua filino de Anna de Bretonio kaj de Ludoviko la Dekdua.

Tie mortis Anna de Bretonio.

**Guérande:** urbo en suda Bretonio. Tie estis subskribita traktato inter Karolo la Kvina, reĝo de Francio, kaj Johano de Montfort, per kiu

Johano de Montfort estis agnoskita kiel la vera duko de Bretonio sub la nomo Johano la Kvara. Laŭ tiu traktato, la familio de Montfort rajtus konservi la duklandon, nur se plu estus vira posteulo kaj manke de vira posteulo, la familio de Johana de Pentievro siavice heredus la duklandon de Bretonio.

**Langeais:** urbo sur la rivero Loire. Tie la franca reĝo Ludoviko la Dekunua, kiu timis atakon de la bretonoj, konstruigis kastelon por defendi Francion. Tie en la kastelo, Anna, dukino de Bretonio edziniĝis al Karolo la Oka, reĝo de Francio.

**Nantes:** urbo sur la rivero Loire. Tie en la kastelo naskiĝis Anna de Bretonio. Tie, Anna de Bretonio edziniĝis al Ludoviko la Dekdua en la kapelo de la kastelo.

**Rennes:** ĉefurbo de Bretonio, kie la dukoj de Bretonio estis kronitaj. Tie, Anna de Bretonio, kiu estis nur 12-jara, estis kronita dukino en la katedralo de Rennes meze de entuziasma loĝantaro.

**Romorantin:** Tie naskiĝis Klaŭda, la unua filino de Anna de Bretonio kaj de Ludoviko la Dekdua.

**Saint-Aubin-du-Cormier:** Tie la franca armeo venkis la bretonan armeon en la 28-an de Julio 1488.

**Vannes:** Tie la Ordarasembleo de Bretonio aprobis la kuniĝon de Bretonio al Francio en 1532.

## 13 La ĉefaj datoj

**1365 (12-an de Aprilo):** traktato de Guérande.

**1455:** Francisko la Dua, duko de Bretonio edziĝis al Margareta de Bretonio, filino de la Francisko la Unua, duko de Bretonio.

**1469 (25-a de Septembro):** morto de Margareta de Bretonio, unua edzino de Francisko la Dua, duko de Bretonio.

**1471 (26-an de Julio):** geedziĝo de Francisko la Dua, duko de Bretonio kaj de Margareta de Foix, gepatroj de Anna de Bretonio.

**1477 (25-an de Januaro):** naskiĝo de Anna de Bretonio en Nantes.

**1481 (10-an de Majo):** traktato inter la duko Francisko la Dua kaj Eduardo la Kvara en kiu estis promeso pri geedziĝo inter Anna kaj la kronprinco aŭ mankokaze la duko de York (filoj de la angla reĝo).

**1486 (15-an de Majo):** morto de Margareta de Foix, patrino de Anna.

**1488 (28-an de Julio):** malvenko de Saint-Aubin-du-Cormier.

**1488 (9-an de Septembro):** morto de Francisko la Dua, patro de Anna. Anna fariĝis dukino de Bretonio.

**1489 (10-an de Februaro):** kronado de Anna en Rennes.

- 1490 (19-an de Decembro):** geedziĝo per prokuro de Anna kaj Maksimiliano.
- 1491 (6-an de Decembro):** geedziĝo de Anna kaj de la franca reĝo: Karolo la Oka, en Langeais
- 1492 (10-an de Oktobro):** naskiĝo de Charles-Orland en Plessis-lez-Tours.
- 1495 (6-an de Decembro):** morto de Charles-Orland pro epidemio de morbilo.
- 1498 (7-an de Aprilo):** morto de Karolo la Oka.
- 1499 (8-an de Januaro):** geedziĝo de Anna kaj de Ludoviko la Dekdua en Nantes.
- 1499 (15-an de Oktobro):** naskiĝo de Klaŭda de Francio en Romorantin.
- 1504 (18-an de Novembro):** dua kronado de Anna en Saint-Denis.
- 1510 (20-an de Oktobro):** naskiĝo de Renata, dua filino de Anna.
- 1514 (9-an de Januaro):** morto de Anna de Bretonio en Blois.
- 1514 (8-an de Majo):** edziniĝo de Klaŭda al Francisko de Angoulême, estonta reĝo de Francio.
- 1514 (21-an de Decembro):** morto de la edzo de Anna: Ludoviko la Dekdua.
- 1515 (1-an de Januaro):** Francisko de Angoulême fariĝis reĝo de Francio sub la nomo Francisko la Unua kaj Klaŭda forcedis ĉiujn siajn rajtojn pri Bretonio al sia edzo.
- 1532 (4-an de Aŭgusto):** kuniĝo de Bretonio al Francio.

## 14 Franca esperanta vortaro

**Assemblée des états:** ordarasembleo (assembleo de la ordoj: nobelaro, klerikaro kaj la tria ordo).

**Tiers état:** la Tria ordo (la neklerikoj kaj nenobelaj)

**Etat:** ordo (nobelaro, klerikaro aŭ la tria ordo konsistanta el la aliaj personoj)

## 15 Referencoj

- [1] HISTOIRE DE BRETAGNE, Bande dessinée. Tome 3 1341-1532, DU DUCHE A L'UNION. Reynald SECHER et René LE HONZEC. Éditions Reynald SECHER 39, boulevard Barbot 35530 NOYAL-SUR-VILAINE. Dépôt légal: novembre 1993.
- [2] Histoire de Bretagne. Henri Poisson et Jean-Pierre Le Mat. Illustrations de XAVIER DE LANGLAIS. COOP BREIZH. Troisième édition. 2000.
- [3] Anne de Bretagne. Georges Minois. Fayard. 1999.

